GISTO,JUNIO,2010.
Str.Esperanto, 880
95760-000 Kaiurbo-RS
Redaktas ottovaske@ibest.com.br
Donace por VK-ĉeestantoj
Krom foraj loĝantoj, R$ 1,00.

.....

RESOPIRO

Kiam samideano vigle aktiva longe silentas aŭ malĉeestas dum rutinaj kunsidoj, oni sentas saŭdadon pri li/ŝi. Tiel okazas nuntempe manke de partoprenoj far nia aktivulo Arno. Li ĝuas komforton en Usono, ĉe lia filo, alta aeroficiro. Tia ĝojo ja estas nur reva ĝuo por ni, povraj tertretemuloj. Sed mi bedaŭras ke li ne eltrovis manieron almenaŭ per e-poŝto kaŭzi envion al siaj gaŭĉaj kompanoj. Ni esperu ke lia mono baldaŭ finiĝos kaj li devos reveni al sia nesto apud Laĵeado-RS kaj al niaj babilrondoj.

BALENOJ

Al pli ol dudek geamikoj kies e-adreson mi posedas mi sendis e-petskribon kun la insisto ke ni ĉiuj arege subskribu ĝin. Ĝi celis fini la balenokaptadon en la suda Atlantiko. Se vi ignoris tian noblan agon vi iom kulpas pro la fiasko. Mankis ne multego por atingi unu milionon da signaturoj sed ne sufiĉis, laŭ informis la organizaĵo “Fala Bicho”.Domaĝo ĉar la stulta ĉasado far Japanoj kaj du aliaj landoj insistas sur la preteksto ke Japanio daŭrigas ĝin por sciencocela serĉesploro, laŭ ilia aserto.

“MÜNZE”

Germanlingva vorto prononcata ieltiel : MINCE, por difini metalan disketon kiel moneron utilan por funkciigi aŭtomatan vendoŝrankon kie akireblas trinkaĵon aŭ telefonaparaton.
Amiko Zaghetto mencias ke tia vorto utilas en nia lingvo. Ĉertagrade li sugestas la formon MINSO. La vorton mi trompite metis en unu el la lastaj Gisto kun la senso « malforta, senvalora ». Tiu mia fuŝo irigis min konsulti na PIV, kie la vorto estis ne tuj trovita. Nur poste mi trovis MINCA=maldika. Jen do mia erara uzo, pardonpeto kaj ankaŭ pravigo, ke ie mi estis vidinta ĝin, verŝajne en poezio.La diligente zorga Zaghetto sugestas ke oni (ĉu GEA ?) proponu la novan necesan vorton al la Akademio de Esperanto por enkonduki ĝin en la E-vortaron. ...---... Aldonindas multaj vortoj. Ekz. “Chuteira” oni traduku per la vorto ŝotilo? Aŭ per? aŭ futbalŝuoj(germaniere)?... Aŭ per ŝotbotoj? – Laŭ mi, ne adekvataj vortoj kaj, se Esperanto estas lingvo aperta, ni inventu kurtan,taŭgan vorton, kiu ne malhelpas la elparolon kaj komprenon, kompreneble.

ORELTIRETOn

Al ĉiu samideano, kiu malzorgas la fluecon de sia parolata Esperanto, ĉefe al la karaj inoj. Ilia ĉeesto altvalorigas la nivelon de VK-kunsidoj, ĉefe por la publiko kiu observas nian vigle paroleman grupon. Ni ja ne estas kaj devas ne aspekti kiel kliko el drinkemuloj.

SEKSRILATAJ TEMOJ

Viroj kaj same virinoj interesiĝas pri temoj kiuj klarigas pri seksaj aferoj. Kutime geedzoj malmulte sukcesas ekscii pli ol magazinoj publikigas, preskaŭ ĉiam nur por eksciti interesiĝon pri la teksto publikigata. Okazas ke viroj surstrate sentas sin kvazaŭ barataj fare de profesiaj ĉiesulinoj, kun la celo enkasigi sian tagan "salajron". Ŝajnas ke ili prefere alparolas grizulojn. Certe mi ne estas escepto kaj ili pensas ke olduloj kunportas stakon da bankbiletoj kaj junuloj troe marĉandas. Kiam oportunas mi lasas min haltigi kaj konsentas iom babili. Okazis iam kun japanidino. Mi rakontis pri sia privata vivo. Ŝi sin diris studenta de la tria grado. Mi scivolis ĉu eblas teni sin en fakultato per kio ŝi perlaboras, ĉu ŝi havas infanojn, ktp, ŝi jesis kaj aldonis ke ŝin interesas fariĝi avia stevardino ĉar krom la japanan ŝi regas la anglan lingvon. Simpatia knabino 23-jara, inda havi sukceson atingi la revatan postenon. Kial ne, se multaj "Patricinjas"* rolas estuloj senmakulajn el nia altnivela socio? – Mia solida hejma kompromiso rajtigas min sendanĝere ekskursi en tia medio. Same aliaj solide edukitaj edzoj tion rajtas, se ili hejme rakontos la rezulton al siaj dumvivaj kunulinoj.

Favoru per rideto:

AŬTOPOSEDANTO

Du amikoj interbabilas.

- Nu, ĉu vi posedas aŭton?
- Jes...ne, se klardire, pli malpli...
-Jen klarigenda afero...ĉu vere jes aŭ ĉu vere ne?
  - Ekspliku al mi tiun vian aŭtoposedon.
  - Ĝi apartenas al mia edzino,
  - kiam ŝi decidas fari aĉetojn.
  - Apartenas al mia filo por promeni kun sia amatino. Apartenas al mia filino, kiam ŝi eldomiĝas por viziti diskotekon. Fine ĝi estas mia, post kiam sekiĝis la benzinujo.

RUZA EDZINO

- Per telfono: karulo, la motoro ne startas, havas akvon en la karburilo.
- Ĉu vi vokis mekanikiston?
- Ne!
- Do kiel vi sciiĝis pri la problemo?
- Mi opinas tiel!
- Bone...bone, mi renkontos vin post dek minutoj...
- Nu, kie staras la aŭto?
- ene de la naĝejo!